

József Katona

(1791-1838)

[Pron.: jo:l'jef kaltona.] *Li naskiĝis kiel filo de simpla teksisto, kaj fariĝis ĉefprokuroro de la urbo Kecskemét, sed jam de la frua junaĝo lin allogis la literaturo. Li estas dudek kvar jara, kiam li finas sian solan vere signifan verkon, la tragedion Bán Bánk, kaj per tio li fariĝis aŭtoro de unu el la plej gravaj hungaraj naciaj dramoj. Sed li mem ne sciis pri tio: kvankam la dramo aperis libroforme en 1820, ĝi restis sen reeĥoj, kaj eĉ la teatra premiero en 1839 ne alportis veran sukceson. La dramo de Katona povas okupi indan lokon en la hungara dramaturgio nur ĉirkaŭ kvindek jarojn post sia verkiĝo. Sed de tiam ĝis nun ĝi restas seninterrompe en la repertuaro de la hungaraj teatroj. Tiu sukceso ŝuldiĝas neniel al ia pietato, sed la potenco lingvaĵo, riĉe kaj profunde karakterizitaj personaĵoj kaj eminenta konstruo de la verko.*

Bán Bánk

(Fragmento)

[La tragedio okazas en la 13-a jarcento. Bán Bánk, vicreganto, anstataŭanto de reĝo Endre la 2-a krucmilitanta en la Sankta Lando, ekscias, ke la hungaraj nobeloj preparas ribelon, indigne pro la konduto de reĝino Gertruda. Ankaŭ mem Bánk dolore vidas, ke la reĝino donas la bienojn unu post la alia al siaj Meranaj samlandanoj, kiuj senindulge ekspluatas la servutulojn kaj estigas nedireblan mizeron en la tuta lando, tamen, pro sia fidelo al la reĝo, li intencas ĉiel eble malhelpi la ribelon.

Dume Otto, frato de reĝino Gertruda, enamiĝinte al Melinda, edzino de Bánk, volas ŝin delogi. Bánk hazarde subaŭskultas lian amindumon al Melinda, kiu lin indigne rifuzas. Granda konsterna kolero ekbolas en lia animo. Tamen li venkas super sia kolero kaj forrapidas por pacigi la ribelulojn kunvenintajn en sekreta loko.

Tie ĉi Biberach, vagabonda kavaliro, iama kunkulpulo de Otto, sciigas al li, ke Melinda dume verŝajne fariĝis, kun la scio de la reĝino, viktimo de la amo de Otto. Rerapidinte al la palaco, li trovas tie Melinda-n, de kiu li ekscias, ke Otto vere perfortis ŝin: ŝi ne povis kontraŭstari, ĉar ŝi sentis „inferan fajron en la ostoj”. Bánk kredas, ke pro amtrinkaĵo donita de l' reĝino.

En tiu ĉi animstato haltigas lin Tiborc, la mizera kamparano, per sia korsira plendo. Dum ĝia aŭskulto doloraj pensoj pri sia propra sorto, kaj pri la sorto de l' popolo, konfuze kirligas en lia cerbo. Ekstreme ekscitite li ekiras la la reĝino, por ŝin prirespondigi.

Li perforte penetras en la ĉambron de la reĝino. Amare li riproĉas ŝin. La interparolo iĝas ĉiam pli kaj pli ekscitita. Kaj tiam enpaŝas Otto. Bánk furioze sin ĵetas kontraŭ lin. Otto forkuras, ŝlosinte post si la pordon. Bánk, batante la ŝlositan pordon malbenas lin kaj lian patrujon. Tion aŭdinte, la reĝino ekkaptas ponardon kaj lin atakas kun la vortoj: „Fripono, ne insultu mian patrujon.” Bánk eltordas la ponardon el la mano de la reĝino kaj ŝin mortpikas.

Endre revenis el la Sankta Lando. Neniu scias, kiu mortigis la reĝinon. Nun venas Bánk kaj konfesas ke li estis la justa mortiganto. Sed tiam klariĝas, ke la reĝino estis senkulpa en la krimo de Otto. La animo de Bánk rompiĝas. Poste alvenas Tiborc kun la sciigo, ke Melinda mortis. La reĝo pardonas al Bánk, kiun tute frakasis la sorto.

La sube publikita fragmento entenas la plendon de Tiborc. Por kompreni la konfuzan parolon de Bánk oni rimarku, ke li nur duone aŭskultas la vortojn de Tiborc, ĉar lin konstante okupas lia propra vivtragedio, kaj la ekkaptitajn vortojn de Tiborc li rilatigas al sia propra sorto, al Melinda, al la prepariĝanta ribelo.]

Bán Bánk

Tria akto, tria sceno

(*Bánk sur la scenejo, Tibors enŝteliĝas inter fido kaj timo*)

TIBORC:
Bánk! Grandsinjoro! Ho! Matenon bonan.

BÁNK:
Bandito!

TIBORC:
Ĉu vidiĝas sur mi tio?

BÁNK:
Ja kial la honesto inter homoj?

TIBORC:
Tre vere! Jen, griziĝis mia kapo.

Kial?

TIBORC:
Forpasis mia temp' dum veoj.

BÁNK:
Tial naskiĝis mi...

TIBORC:
Mi dankas. Nun
vi ne koleras jam, kiel ĉinokte.

BÁNK:
Laboru, hom', kaj ne lamentu!

TIBORC:
Dio!
Nur unufoje vi en mian domon
rigardus, tie vidus vi la plendon
vivantan. Kial estis mi honesta?
Ja, se fripon' mi estus, ankaŭ nun
mi estus via -

BÁNK:
Kiel malfeliĉas,
kies katenoj, kiaj ajn, solviĝas
en tiel malfeliĉa maniero!

TIBORC:
Kiel mi ĝojis, ke mi liberiĝis!

BÁNK:
Kiel mi ĝojis pri katenoj miaj!

TIBORC:
Ja vere, tio estas bona, sed
de kiam tiuj merananoj...

BÁNK:
Ho!

TIBORC:
Ili bezonas multan monon, kaj
ĉar ni ne povas doni tiom, ili
sur nia kol' malgrasa izmaelidojn*
sidigis - tio krias al ĉielo!

BÁNK:
Fi!

TIBORC:
Mi toleris, ĝis mi povis. Nun
mi estus jam fripono, sed - malfrue!
Kap' griza, brakoj sekaj - kien iri?

BÁNK:
Banditi - jen la sola elirvojo.

TIBORC:
Ĉi-nokte provis mi unue tiun
metion, ho, ĉar pro l' edzin' malsana
kaj pro la kvin malsataj infanetoj
la koro preskaŭ saltis el la brusto.
Sed, Dio vidas, ĝin mi ne scipovas.
Malsupre, antaŭ l' reĝa domo mi
flankumis. Ho - interne oni gajis!
Multfoje mi rimarkis, ke la langon
eligis mi, volante kvazaŭ leki,

* Muzulmanajn komercistojn

kion disverŝis ili tie supre.
Tiam vi ŝtele tra la pordo venis,
mi aŭdis viajn vortojn al gardisto.
Do mi postsekvis vin, kaj ĉar mi povis
tuj diri, kiu venis ĵus sekrete,
min ĉiu kredis al vi apartena.

BÁNK:

Fi! Sekve ĉio estas falsa kaj
nin trompas: oni serĉu kie ajn
kaj kiun ajn – ja ĉio, kvankam ŝajnu
ĝi eĉ plej pura, malpuregas tamen!

TIBORC:

Kial nin stampas tiel la neceso?

BÁNK:

Sed, se mi bone nun pripensas, mem
la pura fideleco . . . ej, sed kion
pripensi plu ĉi tie? Fideleco?
Fantom', pri kiu ĉiuj homoj klaĉas,
sed kiun ja neniam iu vidis.

TIBORC:

Ho, bona Dio, mi denove kredas,
ke li al mi parolas . . .

BÁNK:

Diru, diru,
mi bone aŭdas vian plendon, sed
parolas ankaŭ mia plend'.

TIBORC:

Kreinto!
Eĉ Grandsinjoro havas ĝin! Nu, do
la kompatinda Tiborc ja ne pekas,
se li jeĵuras al sekreta bando.

BÁNK:

Ho Dio, ke pri tio mi forgesis!

TIBORC:

Alia elirvoj'? Bravulajn agojn
ja oni de mi ne pretendu, sed
en la milito licas kapti predon.
Ĉi penso ŝajnis al mi la plej bona.

BÁNK:

(morne elrigardas tra la fenestro)
Patruj' hungara!

TIBORC:

Kaj ja faras tion,
eĉ sen milit', la bonaj merananoj.
Ĉar sufiĉe pagas ja la judoj.
Kiuja proredire oni eĉ
ne povas nomi homsenfeligistoj,

ĉar haŭt' necesas ja por tio, kaj
ĝin mem la merananoj jam detiris
de niaj ostoj; tiel ili do
jam devas tranĉi en la karnon. Vere,
ke la tranĉito krias, sed aŭskulti
ja ne necesas tion, se nur estas
profit'. La Granda Sinjorino . . .
(li mansvingas kun amara malestimo.)

BÁNK:

*(premante sian kapon al la
fenestro-kadro)*

Ho!

TIBORC:

Ŝi konstruigas luksajn kaj marmorajn
palacojn dum ni glaciigas inter
vergmuroj de l' kabano.

BÁNK:

Malbenita!

TIBORC:

Ŝi horde havas siajn alkurintajn
servistojn, kvazaŭ ĉiu har' bezonus
apartan gardon: multajn merananojn.
Ja oni kredus ofte, ke pendigi
oni ŝin portas, tiel ŝin ĉirkaŭas
nenifaristoj, dum ni – eĉ sesope
ne povas dungi noktgardiston aĉan.
Senĉese faras ŝi dancfestojn, kvazaŭ
ŝi havus ĉiam aŭ edziĝfestenon,
aŭ baptofeston – kaj en mi frapegas
la koro, kiam la drinkejhelpanton
ni ekrenkontas sur la strato, ĉar
tuj venas nia ŝuld' en nian kapon.
Sub merananoj baŭmas la plej bela
ĉeval': hieraŭ blanka kaj hodiaŭ
flavruĝa, morgaŭ flava, dum ni devas
edzinon kaj infanojn niajn jungi,
se ni ne volas morti de malsato.
Senĉese ili ludas kaj manĝegas,
jes, kvazaŭ ĉiu eta membro havus
stomakon propran – de kamenoj niaj
pereas cikonioj, ĉar ni mem
konsumas la falaĵojn. Ili faris
el niaj belaj teroj ĉasarbaron,
en kiun ni ne povas eĉ enpaŝi.
Se, laŭ deziro, de l' edzin' malsana,
aŭ variola infanet', ni kaptas
kolombon – sekvas ligo al kolono.

Kaj kiu rabas milojn kaj centmilojn,
iĝos juĝisto pri l' kompatindulo,
kiun mizer' devigas ŝteli groŝon.

BÁNK:

Ve, ke vi pravas!

TIBORC:

Templojn, monaĥejojn
ili konstruas, kie tiel oni
orgenas, kantas, ke la pilgrimantoj
deviĝas danci sur la kota strato.
Kaj al ni mankas eĉ kitelo bona,
en kiu oni povus montri sin
antaŭ ŝatata gardsanktulo, en la
preĝejo.

BÁNK:

Ho, nur bolu, sang', nur bolu!

TIBORC:

Kaj se ni volas plendi, ni ja devas
antaŭe lerni skribon, ĉar malriĉa
kampul' ne povas stari antaŭ l' Reĝo.
Tiel ordonis reĝo Béla kaj
la merananoj tion elprofitas,
ĉar malriĉul', per sia kalkanfero,
ja skrapus la pavimon belan, glatan!
Kaj se por niaj lastaj heleretoj
eĉ skribos niajn plendojn jursciulo,
kiu ja skribos la amarajn larmojn,
ke nia bona reĝo ilin vidu?

BÁNK:

Vi, Dio!

TIBORC:

Ili devus ja ruĝiĝi,
kiam arĝentaj, oraj zonoj frapas
ilian kruron, ĉar ja ili estas
la frukto de ŝvitado nia sanga.
Je mia fid'! prefere ili ligus
vualon nigran sur la ventron por
almenaŭ nur ekstere montri sian
funebtron pri la povraj mizeruloj,
kiujn ilia tord' netolerebla
faligas al la tomb'.

BÁNK:

Toleru pace!

TIBORC:

Toleru pace, ofte ja predikis
abato nia tion ĉi; feliĉaj
la pacemuloj, ĉar ili nomiĝas
filoj de Dio; sed stomako lia
ja estis plena, Dio! Kiom taŭgas?
Se premas nin mizero, la inferon
ni ne plu timas, kaj eĉ la ĉielo
ne ŝajnas al ni tiel belaspekta.

BÁNK:

La barojn ni disrompas; ni frakasas
amikon, malamikon, kaj, se venis
ni al la cel', ni devas plori, plori.
Ho homoj, ni kompatas viajn veojn.

TIBORC:

(ridas)

Kompat'?' Ho Grandsinjor', eĉ la
hungaro
nin ne tre zorgas, se al li plenplenas
la poŝo, – la Natur' la malriĉulon
destinis ja nur por naskiĝi, vivi,
labori kaj malsati kaj mizeri
kaj morti. Jes ja. Oni devas koni
la sorton de l' hundvivaj mizeruloj,
por ke ĝin oni lernu ekkompati.

BÁNK:

(kolere lin alrigardas, sed lia rigardo
haltas sur vundo, kiun Tiborc havas sur la
frunto)

TIBORC:

(rimarkas tion kaj volas kaŝi ĝin per
siaj malmultaj haroj)

Dudek ses jaroj pasis jam de tiam,
malforta bub' vi estis, ĉe Jadera
Venecian' malbona volis vin
kaj vian patron... eh, afer' malnova...

BÁNK:

(premas, dum ĉirkaŭprenado, la frunton
de Tiborc al sia brusto, poste premas
monujon en lian manon)

Min, kaj la patron – iru, iru, iru!

TIBORC:

Bela sumet', sed ĉu vi povas doni
al ĉiu mizerulo? ĉu redonos ĝi
la larmojn, kiuj falis pro mortintoj?
Ho, se alion doni vi ne povas,
vi estas pli malriĉa, ol al kiu
vi donas. Kaj vin gardu! ke ŝtelisto
kune kun la monuoj plenŝtopitaj
ne ŝtelu de vi la grandanimecon.

BÁNK:

(*digne*) Tiborc, Tiborc, al kiu vi parolas!

TIBORC:

(*falas sur la genuojn*)

Dio, mi volas ja, ke mi pereu,
Krimulo mi ne estas, tial mi
ne riskas min mortigi, ĉar mi timas
de la koler' de Dio.

BÁNK:

Iru, iru,
Tiborc, edzinon mian serĉu, kaj
trovinte ŝin, revenu, min atendu.
Vi iros hejmen – diru tie: vivas
ankoraŭ Bánk.

TIBORC:

Ho jes, najbaroj karaj,
ankoraŭ vivas patro Bánk – mi krios.
(*Plorante li foriras*)

(*Kálmán Kalocsay*)